

Sud-Rejna Kuriero

Aŭgusto
2015

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°59

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,

Fine de julio okazis en la urbo Lillo la 100a Universala Esperanto-kongreso memore al la unua, kiu okazis en Bulonjo-ĉe-maro en 1905. Pluraj membroj de nia asocio ĝin partoprenis. Certe en ĉi-tiu numero ni ne raportos pri la multaj kunvenoj, prelegoj, koncertoj, teatroĵoj, kiuj okazis kaj estis ligitaj al tiu grava historia evento.

Dank'al Bertrand kaj Anne vi trovos pri ĝi iom da fotoj, raportoj aperintaj en niaj lokaj ĵurnaloj pri la partoprenado de samideanoj el nia regiono, tio ebligas iel konigi nian lingvon al la ekstera publiko.

Dankon al Bernard, kiu bonvolu iom skizisian UK-semajnon

Vi legos pri malpli grandaj eventoj, feriado en Rumanio, amika tago en la Vogezoj kaj pri niaj verdaj fadenoj, kaj "vivu via strato"

Kaj laste ankaŭ pri nia venonta regiona staĝo en Pforzheim organizita de Bavelo.



André Grossmann

Programo 2015

ESPERANTO - SOCIETO BASEL

Ĵaŭde	24.09.2015	Monata kunveno en Riehenring Pri somero kaj ferioj	
Lunde	26.10.2015	Verda fadeno en Saint-Louis	
Ĵaŭde	26.11.2015	Monata kunveno en Riehenring Planado de la venonta jaro	
Sabate	? .12.2015	Zamenhofa Festo en Freiburgo	Nicole Béroud

"Vi memoru (notu en vian kalendaron)" : Sabaton la 3an de oktobro de 2015 de la 10a ĝis la 18a en la domo "Carré des associations" 100 avenue de Colmar en Mulhouse,
La 1an inform-eventon: "Tago de Esperanto kaj de la Mondcivitaneco", organizitan de Jacques PINEDA kaj Robert KUENY, ambaŭ esperantistoj kaj mondciĵanoj. Venu multnombraj kun geamikoj kaj parencoj.

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2016-2018

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivadojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro	Kotizo	Abono	Kolora ekzemplero
2016	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	14 eŭroj
2017	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	
2018	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj	

Aktualigitaj informoj aperos daŭre ĉe:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Niaj membroj ankaŭ estos informitaj per nia dissendo-listo:

mulhouse-esperanto@yahoogroups.fr

Por babili en Esperanto ni uzas jenan dissendoliston:

verda-babilejo@googlegroups.com

Enskribiĝo: verda-babilejo+subscribe@googlegroups.com

Esperanto-horloĝoj

Jam komence de la jaro S-ro Fernando KINKANI N'KANU el Colmar proponis akiri Esperanto-horloĝon, kun mencioj pri Esperanto sur la antaŭa kaj dorsa flankoj.

Okaze de la 100-a jubilea UK en Lillo, li proponis specialajn horloĝojn kun la bildo de UK-Lillo, kun dato.

Nun ekzistas horloĝoj por viroj kaj por virinoj.

Ni proponas al vi sendi minimume 15 eŭroj kaj eventuale 2 eŭrojn por la sendkostoj.

Jen kion skribas la vicprezidanto Eŭropa Afrika Solidareco



Karaj gesamideanoj, Saluton !

Post la disvendadoj de brakhoroĝoj dum la 100-a jubilea UK de Lillo 2015, restis kelkaj, kompreneble ankaŭ por Eŭropa Afrika Solidareco, tial ni daŭrigas la vendadon perkorponde kaj per la reto.

La profito de la disvendado estos uzata por financi niajn projektojn rilate al la konstruado de profesiaj lernejoj en Afrikaj vilaĝoj kunlabore kun TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj). Ni proponas:

- ◆ Brakhoroĝo por viro kaj virino kun dato : 15 € sen sendokosto;
- ◆ Brakhoroĝo ordinara : 10 € sen sendokosto;
- ◆ Por la sendkostoj bonvolu aldoni 2 €

La interesatoj povas rekte mendi ĉe Eŭropa Afrika Solidareco je la jena adreso :

Kinkani Nkanu Fernando,

4, rue d' Amsterdam 68 000 Colmar Francio

Retadreso: angolafernando@yahoo.fr

Telefonnumero:0033(0)62 31 888 76.

Bonvolu ĝiri la monon al la konto de la kasisto de TAKE

André Grossmann, por Francio **CCP** 819 34 U Strasbourg,

Internaciaj ĝiroj al: **IBAN**: FR6920041010150081934U03669

BIC: PSSTFRPPSTR

Ankaŭ eblas pagi al la UEA-konto de TAKE: ekat-i.

Victor Lufimpu

Vicprezidanto



Dorse de la horloĝo troviĝas la bildo de Zamenhof

Ils l'ont fait... à côté de chez nous

Canton de Neuchâtel, Suisse : Troisième Conférence Mondiale sur l'Enseignement de l'Espéranto – du 13 au 16 mai

Les cantons suisses ont le statut d'État: belle occasion pour Mireille Grosjean, présidente de la Ligue mondiale des enseignants d'espéranto (ILEI), de convaincre le canton de Neuchâtel d'inviter les ministres de l'Éducation de tous les pays à venir faire le point sur l'enseignement de la langue internationale. Du 13 au 16 mai, une cinquantaine de participants (dont une dizaine de Français) d'une dizaine de pays ont pu écouter à l'université de Neuchâtel et à La Chaux-de-Fonds, les interventions des universitaires, chercheurs et enseignants venus d'Europe, mais aussi des États-Unis sur l'intérêt de la langue internationale "meilleure voix de communication", "vraie voix pour la démocratie" et surtout "joyau pédagogique".

Plus d'information sur le site internet d'Espéranto-France, sur celui d'ILEI et, en espéranto, sur Wikipedia. (Info: Renée Triolle).



Vojaĝo tra sud-orienta Rumanio

En Verdun, okaze de nia regiona staĝo, Rodica Todor prelegis pri Rumanio kaj programon pri la ĉi-jaraj ekskursoj. Ŝi proponis viziton al la delto de Danubo kun loĝado sur hotelo-ŝipo. 17 personoj akceptis kaj povis ĝui tiun mirindan vojaĝon, ili venis el Francio, Belgio, Japanio kaj Italio.

Tiu vojaĝo konsistis el tri partoj. Unua parto: la ĉefurbo Bukareŝto, dua parto: Braŝovo kaj Transilvanio kaj tria parto: la Delto de Danubo. En la ĉefurbo eblis admiri la reĝan palacon, multajn novklasikajn konstruaĵojn de la malnova urbo, kelkajn belajn preĝejojn kaj la gigantan konstruaĵon planitan de la diktatoro Ĉeaŭŝesku (pli ol 1000 ĉambroj kun 350000 m², la dua plej granda administra domo en la mondo post la Pentagono), kiun la respubliko decidis finkonstrui post la falo de la diktatoro kiel domon de la parlamento. En Bukareŝto



Folkloraj dancoj en la subĉiela nacia muzeo de la vilaĝo "Dimitrie Gusti"

estas vizitinda ankaŭ subĉiela muzeo, kie oni kolektis malnovajn domojn el diversaj partoj de la lando. Tie eblis ankaŭ ĝui folklorajn dancojn.



Survoje al Transilvanio ni haltis en Sinaia sude de la Karpatoj por viziti la kastelon Poleŝ, some- ra rezidejo de la iama reĝo, monaĥejon kaj la domon de George Enesco, granda violonisto kaj komponisto. Transilvanio troviĝas meze de la lando, norde de la suda branĉo de la Karpatoj, kies kulmino atingas 2500 m. Dum kvar noktoj ni loĝis en agrabla hotelo en Braŝovo kaj de tie ekskursis en Transilvanio buse. Braŝovo mem estas belega urbo ĉirkaŭita de montoj. Transilvanio ligiĝas al Drakulo, romano de Stokes, historio pri grafo Drakulo, vampiro, kiu nutras sin per sango de homoj. La kastelo Bran iom norde de la Karpatoj iĝis la kastelo de Drakulo, kiun miloj da turistoj vizitas ĉiutage. Sed la princo

Vlad Tepeș nomita ankaŭ dragul (drako), kiu vivis en la 15-a jarcento, verŝajne ne longe loĝis en Bran. Ne gravas, la kastelo estas bela. Aliaj ekskursoj kondukis nin al la belaj urboj Sibiu kaj Sigiŝoara. Survoje al Sibiu ni povis ĝui viziton de bredejo de lipicaj ĉevaloj, la altvalora raso, kiun uzas la hispana rajdoskolo de Vieno. La bredejo havas ĉirkaŭ 300 lipicajn virĉevalojn, kiuj restas en la stalo, sed devas kuri ĉiutage. Alia interesa vidindaĵo en Transilvanio estas la fortifikita preĝejo Prejmer. Fakte,



En Sibiu, antaŭ la domo de Andreo Cseh



Ne timu, Drakulo estas nur legendo

temas pri tuta vilaĝo ĉirkaŭita de murego. Kaze de atako de malamiko en la malsekuraj tempoj (15-a – 18-a jarcentoj) la loĝantoj forlasis sian vilaĝon kaj kampojn kaj vivis en la citadelo, kie ili havis stokon de nutraĵo por elteni sieĝon, metiejojn kaj eĉ lernejon.



Fine, ni vojaĝis al la Delto de Danubo, en la urbo Tulĉea, ni povis enŝipiĝi. La rivero longa 2500 km dividiĝas en tri brakojn 100 km antaŭ la Nigra Maro, inter kiuj la delto ampleksas 5000 km² kaj tie oni trovas unu el la plej riĉaj ornitologiaj faŭnoj en la mondo kun 4 milionoj da bir-



Ardeo

doj de 300 specoj. Ni loĝis en komforta ŝipo, kiu haltis dumnokte. Matene kaj



Nia hotel-ŝipo



Pelikanoj

posttagmeze ni vojaĝis per motorboato dum 3 horoj kaj retrovis la ŝipon en nova loko por tagmanĝo, vespermanĝo kaj dormo. Per la motorboato eblis veturi tra malprofundaj, mallarĝaj kanaloj (unu fofon tamen la boato restis blokita sur falinta arbo, kiu kuŝis sub la akvo, sed la sti-



risto lerte liberigis ĝin). Eblis vidi multajn birdojn, ilin foti aŭ observi per binokloj: ardeojn, egretajn ardeojn, fulikojn, pelikanojn, kormoranojn, tufgrebojn ktp. (la bildo montras krabmanĝantan birdon).

Kiam ni loĝis en hoteloj, kutime ĉiu enĉambrigis post la vespermanĝo. Sed en la ŝipo ni ĝuis agrablajn vesperojn kun rakontoj, ŝercoj kaj diskutoj.

Ĉiuj ŝategis la vojaĝon kaj la kompetentan organizadon de Rodica. Ŝi promesis esplori la eblecojn organizi vojaĝon al aliaj partoj de Rumanio: precipe al la belaj preĝejoj de norda Rumanio. La partoprenantoj esprimis entuziasman intereson kaj atendas la proponojn de Rodica.



Reven-voje ĉe la nigra maro

Amika tago en Remiremont organizita de Ginette la 13an de junio


La amika tago organizita de Ginette okazis la 13an de junio. Tamen pro malcerta vetero por pikniki ekstere, ŝi proponis iom da ŝanĝoj. La unua rendezuo estis je la 11a30 ĉe lago nomata "plan d'eau" en Remiremont. Tie alvenis plej multaj partoprenantoj, el Frajburgo, Gérardmer kaj el Mulhouse. Poste ni kune veturis ĝis la kafeterio de grand-magazeno Cora por tie kune tagmanĝi.

La posttagmeza programo estis vizito al fuorto "Fort du Parmont". Ni kune veturis, sekvante la aŭton de Ginette, la lastaj kilometroj estis sur ŝtona ne asfaltita vojo. Ĉu Ginette eraris pri vojo. Ne, ni efektive atingis la la parkejon de la fuorto.

Tiu defenda fortikaĵo estis konstruita inter 1874 kaj 1876 laŭ la modeloj de la generalo "Séré de Rivières". Similaj troviĝas en la orientaj limoj post la milito de 1870, kiu influis la aspekton de kelkaj landlimaj departementoj.



La fuorto estis forlasita ekde 1960, ĝi estas nuntempe restaŭrata fare de bonvolemujoj de la komitato pri savado de tiu fuorto.





La gvidanto de la fuorto, kun imponaj lipharoj, bone klarigis multajn detalojn de tiu defendo-fortikaĵo. Li montris kiel funkcias la ŝov-ponto ĉe la enirejo kaj ĝin mane manipulis por ni.

Por komuniki kun la ekstero estis instalita optikejo, per tiaj aparatoj eblis komuniki kun la ekstero helpe de sunlumo tage kaj nokte per petrolanpo.



Ekde tiu fuorto eblis ĝui belan panoramon al Remiremont.

Post la vizito, okazis surprizo. Ni kune veturis al agrabla loko ĉe

laĝeto kaj povis altablĝi ĉe ekstera tablo. Membroj el la grupo de Epinal proponis kafon, kukojn kaj aliajn bongustaĵojn. Ni kune ĝuis tiun tagon kaj dankis al la organizantoj, ĉefe al Ginette.



Fotoj kaj teksto de Andreo



Verdaj fadenoj por amike babili nur en Esperanto

La 29-an de junio okazis nia lasta verda fadeno en Saint-Louis por la lerno-jaro 2014/2015. Ni estis entute 7 ĉeestantoj.

La venontaj verdaj fadenoj estas jene planitaj:

28an de septembro en Mulhouse en la kafejo Le Printemps, rue du Printemps.

26an de oktobro en la restoracio "de la Poste" 10 rue de Huingue en Saint-Louis

30an de novembro en Mulhouse en la kafejo Le Printemps, rue du Printemps.

La posedanto de la kafejo Le Printemps en Mulhouse ŝanĝiĝis. Jacques informos ĉiujn, ĉu same povos okazi la kunvenoj kaj manĝoj.



"Vivu via strato" dum 10 dimanĉoj en Mulhouse



Dum 10 sinsekvaj dimanĉoj okazis tiu evento. Esperanto estis menciita inter la diversaj aktivaĵoj, kiuj variis de dimanĉo al dimanĉo.

La 31an de majo deĵoris Fernando kaj Andreo.

En aliaj dimanĉoj deĵoris aliaj membroj de nia grupo por prezenti la lingvon kaj informi pri la lerneblecoj, kun disdonado de kalendarretoj kaj prospektoj.

Espéranto : des Alsaciens au congrès mondial à Lille

Depuis le 25 juillet et jusqu'au 1er août, Lille accueille le centième congrès mondial d'espéranto. Durant une semaine, 2600 espérantistes originaires de 82 pays vont se retrouver pour échanger et partager dans cette langue qui les rassemble.

Un programme riche en conférences, réunions, débats, excursions, animations culturelles et artistiques les attend. Pour Bertrand Wick, initiateur du groupe Espéranto 3F, *"c'est la preuve que la langue mise au point par Ludwig Zamenhof en 1887 du côté de la Pologne continue de faire son petit bout de chemin"*.

Une volonté d'ouverture

Ce congrès mondial est un événement pour le milieu espérantiste français, une occasion unique pour certains de découvrir l'atmosphère d'un congrès mondial.

Espéranto 3F sera représenté avec deux espérantistes de Village-Neuf : Anne Vernet et Bertrand Wick, qui feront partie de l'équipe des bénévoles, et d'une espérantiste ludovicienne.

Le congrès sera axé autour du thème "langues, arts et valeurs dans le dialogue interculturel".


Cela se traduit par une volonté d'ouverture vers le public non espérantiste au travers notamment de cours express, de conférences et d'animations musicales, de façon à faire connaître l'espéranto et l'esprit d'amitié et d'interculturalité qui lui est associé.

s.r.

"Je veux bien donner des cours"

La 9an de aŭgusto aperis plia artikolo en L'Alsace en regiono de Saint-Louis, kun la titolo:

"Je veux bien donner des cours"



Bertrand Wick (à droite) est prêt à donner des cours d'espéranto, s'il y a des amateurs dans la région frontalière.

Photo L'Alsace/Jean-Christophe Meyer

« Je veux bien donner des cours, s'il y a des volontaires. Même par téléphone ou sur skype ! » Bertrand Wick, retraité villageneuvois, est le moteur de l'espéranto dans la région frontalière. « J'ai rencontré l'espéranto lors de la sortie de la première méthode Assimil. Il y a une cinquantaine d'années ! » Postier à Strasbourg, il s'engage alors dans un groupe d'espérantophones. Arrivé à Village-Neuf, il attend la retraite pour s'y remettre. « Je connais l'allemand, le français, je n'oserais jamais enseigner ces langues », confie-t-il. Mais l'espéranto, « c'est tellement facile que je n'ai pas peur ! » La langue, voulue par son créateur Ludwik Lejzer Zamenhof comme universelle. « Bien sûr, comme pour toute langue, il faut un effort de mémorisation, d'utilisation aussi », souligne Anne Vernet, qui a rejoint le groupe des espérantistes villageneuvois dès le début.

Universel, l'espéranto ? Pour le vocabulaire, il puise surtout dans les langues latines, germaniques ou slaves – et laisse donc à l'écart les langues africaines ou asiatiques, par exemple. « Mais c'est une langue agglutinante, qui vane ou Radio Vatican, qui diffusent des programmes en espéranto. » Et il est fier de rappeler que le PIV, le Plena Ilustrita Vortaro de Espéranto, dictionnaire de référence pour la langue de Zamenhof, a été réalisé et édité en France.

donc plaît à certains Asiatiques », souligne Bertrand Wick. Ainsi, les jeunes espérantophones rencontrés à Lille et dans les congrès universels viennent de Chine, du Japon, de Corée... « Le problème de l'espéranto, c'est celui de toutes les langues, il faut l'utiliser. » C'est rigolo, d'ailleurs, « parce qu'on reconnaît très bien les accents, les types de fautes et la prononciation. Les Français, par exemple prononcent les nasales, notamment dans espéranto », sourit Anne Vernet. Elle reconnaît : « Aujourd'hui, je stagne un peu, pour progresser, il faudrait lire, écouter la radio... »

C'est possible, bien sûr. Il existe une littérature, depuis 1887 et l'invention de la langue. Geoffrey Sutton a retracé l'histoire de la création littéraire en espéranto dans un livre en anglais, *Concise encyclopedia of the original literature of Esperanto*. On trouve des romans, de la BD, de la poésie... « Parmi les revues, *Monato* existe depuis 36 ans. Mais on trouve aussi de quoi faire côté radio, avec *Muzaiko*, une chaîne diffusée 24 heures sur 24. Il y en a d'autres, comme *3ZZZ* en Australie, *Radio Ha-*

SE RENSEIGNER Sur www.esperanto3f.info, au 03.89.69.86.42 ou 06.08.71.72.92. Le groupe des espérantistes de Village-Neuf est rattaché à celui de Mulhouse. Une réunion par mois est organisée, alternativement à Saint-Louis et à Mulhouse.

dimanche 9 août 2015 16:25:46 **Espéranto** Un congrès mondial avec des Alsaciens

Les Villageneuvois Bertrand Wick et Anne Vernet ont fait partie de la délégation alsacienne d'espérantistes qui a participé au 100e congrès mondial des locuteurs de la langue universelle créée par Zamenhof. Ils étaient à Lille, la semaine dernière, avec 2700 personnes venues de 82 pays.

Aujourd'hui 05:00 par Textes : Jean-Christophe Meyer

Textes : Jean-Christophe Meyer

« Prenez un Américain qui vit à Barcelone. Il y apprend l'espéranto. Il séjourne ensuite à Nankin, où il enseigne cette langue – c'est là qu'il rencontre sa femme, chinoise. Ils vivent aujourd'hui en Floride. » Des histoires vraies comme celle-là, Bertrand Wick, espérantiste à Village-Neuf, en a beaucoup. L'espéranto a toujours « permis un incroyable brassage », sourit-il. C'était encore le cas la semaine dernière – avec l'organisation, en France, du 100^e congrès mondial d'espéranto.

2700 personnes de 82 pays

De nombreux Alsaciens ont fait le déplacement à Lille, dont Bertrand Wick, accompagné par Anne Vernet. « Je l'ai rejoint dès 2009, quand il a lancé les réunions d'espérantophones à Village-Neuf. » À Lille, le congrès a réuni presque 2700 personnes venues de 82 pays

du monde entier. Les Alsaciens étaient nombreux parmi les bénévoles, au sein de l'organisation (ceux qui ont préparé l'événement en amont) et parmi les Helpantoj ou bénévoles pour accueillir les congressistes.

Rencontrer des espérantophones

Le but principal de ce congrès ? Parler l'espéranto... En rencontrant des espérantophones. « Ce qui est frustrant, c'est qu'il y a des manifestations en permanence et qu'on ne peut assister à tout ! Il faut faire un choix. » Exposition, concerts, conférence de niveau universitaire, réunions religieuses, cours (d'espéranto mais aussi de français), excursions, théâtre, librairie, etc. Sans oublier les retrouvailles. Certains se connaissent depuis longtemps. Anne Vernet a ainsi fait la connaissance d'un couple de Coréens qui habitent aux États-Unis. « Quand ils ont appris que j'habitais en

Alsace, ils m'ont demandé des nouvelles de Bertrand ! »

100^e rencontre

Ce dernier reconnaît que les réseaux sociaux d'aujourd'hui ont grandement facilité la vie des espérantistes. La langue étant universelle, les fans d'espéranto sont invités à voyager. Le 100^e congrès mondial a eu lieu à Lille, « mais c'était à Buenos Aires l'an passé, il se tiendra à Nitra en Slovaquie l'an prochain, puis à Séoul qui l'a emporté face à Montréal », énumère Bertrand Wick – qui a lui-même assisté à quatre d'entre eux.


Anne Vernet conclut : « De nombreuses rencontres suivent ce congrès mondial. Ainsi, le congrès œcuménique d'espéranto, jusqu'au 8 août, à Strasbourg. Ou encore une rencontre de jeunes à Wiesbaden, en Allemagne. » Les stages et rencontres d'espéranto du monde entier sont référencés sur esperanto.com/eventoj.



Okaze de Movada Foiro en Lillo TAKE sin prezentis kune kun IKEF

La 100a Universala kongreso en Lillo estis grandioza. Jam sabate vespere okazis la Movada Foiro. Necesis multaj tabloj por pli ol 120 asocioj. La asocio TAKE havis sian tablon kune kun IKEF (la komercistoj).

Tie deĵoris kelkaj niaj membroj, sed ĉefe Pierre Grollemund. Li klarigis al intereso- satoj la celon de nia asocio kaj montris la lastajn Jarkolektojn. Li sukcesis vendi plurajn ekzemplerojn je favora prezo (ĉar ne estis sendkostoj).



Jen informoj pri la ĉi-jara Jarkolekto de TAKE:

J A R KOLEKTO DE TAKE 2015

JARKOLEKTO de TAKE 2015 estas bel-aspekta libreto en formato A5 kun 68 paĝoj. Ĝin redaktis Pierre Grollemund el Francio. Kvin aŭtoroj kontribuis per artikoloj por tiu teknika verkaĵo. Ĝin ricevis ĉiuj membroj de TAKE. Ĝi estas ankaŭ aparte akirebla por 6 eŭroj (sendkostoj inkluzivitaj).

Nia propono: se vi pagas 12 eŭrojn, vi ricevos la JARKOLEKTON de TAKE 2015 kaj estos membro de TAKE por la jaro 2016.



JARKOLEKTO DE TAKE 2015



Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
Wintzenheim Francio

ENHAVO

- Novtipa forno Walter Klag
- La Ŝanhaja Turo plej alta Pierre Grollemund
- Pasiva burodomego en Vieno W.K.
- Muzeo de la Kunfluejoj PLU P.G.
- La Domo de la Laboro en Saint-Etienne P.G.
- Esperantistaj arkitektoj Henri Masson
- Hidroizolado P.G.
- Pri Rémy BOUCHET P.G.
- Transborda ponto apud Rochefort
- La romia Akvodukto ĉe la rivero Gard
- P.G.
- Masoni per kanabaj brikoj P.G.
- Objektoj en la strato P.G.
- Konstruado de parkejo Roger Condon

Tuttaga ekskurso al Bulojno-ĉe Maro, memore al la unua UK en 1905



Sur la teatra podio sidis la Prezidanto de UEA, Mark Fettes, s-ro L.C. Zaleski-Zamenhof, nepo de Ludoviko Zamenhof, Xavier Dewidehem (prezidanto de LKK). Salutis s-ro Luc Tassart, respondeculo pri Internaciaj Rilatoj por la urbo Bulonjo, kaj la vicurbestrino, s-ino Odette Caerou.

Brian Moon laŭtlegis la tutan prelegon de Ludoviko Zamenhof el la 5a de aŭgusto, 1905. La daŭrigo emfazis la egalrajtecon de la bulonjaj kunvenintoj, kontraste al similaj tiamaj internaciaj renkontiĝoj, kie nur privilegiita minoritato havis la necesajn lingvajn kapablojn por komuniki. La esperantistoj rilatas inter si kiel fratoj kaj egaluloj, ne kiel landanoj superregaj kaj humiliigataj. En malpli konata parto de la alparolo, Zamenhof esprimis sin pri Johann Martin Schleyer, la kreinto de Volapuk, pri kies laboremo Zamenhof esprimis dankon, eĉ se lia projekto jam montris sin maltaŭga por la bezonoj de arta lingvo. Li plie omaĝis al pioniroj, kiuj jam forpasis en la tiam 18-jara historio de la lingvo, inter ili Wilhelm Trompeter. La finon de la alparolo konsistis el rimforma preĝo al ‘supera forto’.

Louis C. Zaleski-Zamenhof diris: “La vortoj de mia avo estas kortuŝaj por mi, precipe la parto pri francoj, angloj, rusoj kaj poloj. Mi ja estas franco kaj polo, sed super ĉio, mi estas homo kaj frato de aliaj homoj.”

Jen resumo de la alparolo de Mark Fettes: Esperanto ja estas lingvo sen teritorio, oni ofte demandas: kie oni parolas tiun lingvon? Ĝi apartenas al neniu nacio, apartenas al neniu specifa loko. Esperanto estas la propraĵo de ĉiuj homoj, kiuj deziras ĝin uzi por komuniki. Li parolis pri la signifaj lokoj por nia komunumo. Inter tiuj Bulonjo – la lulilo de la lingvo. Ĝis tiu unua kongreso, multaj ne aŭdis la parolatan lingvon, krom eble inter kelkaj samlandanoj. Bulonjo markas la transiron de Esperanto de ĉefe skriba lingvo al ĉefe parola lingvo. Lulilo ankaŭ pro la starigo de la Lingva Komitato, kiu poste fariĝis la Akademio de Esperanto. Lulilo de la internacia komunumo; ĝis tiu jaro la parolantoj organizis sin en urbaj kluboj kaj landaj asocioj. Ekde Bulonjo la komunumo fariĝis iom-post-iome transnacia. La plej junaj kongresanoj en Bulonjo estis Edmond Privat kaj Hector

Hodler, kiuj ambaŭ diversmaniere kontribuis forte al tiu internaciigo. Hodler tri jarojn post tiu unua UK fondis Universalan Esperanto-Asocion, sekve tre rekte Bulonjo estas ankaŭ la lulilo de UEA. Lulilo ankaŭ de la Esperanto-kulturo, kiu garantias ĝian vivipovon. Fine, li dankas al la urbo pro la impona akcepto.

Post la solenaĵo, la kelkcent-homa publiko per abundaj flagoj kaj bande-
roloj, promenas tra la urbocentro ĝis la stacidomo, kie Zamenhof kaj aliaj
eltrajniĝis por la unua kongreso. Tie staras monumento pri tiu evento.
Okazis ceremonio en kiu oni malkovris novan ŝildon por memorigi pri la
nuna vizito kaj metis florkronojn. Kunpromenis la Alta Protektanto de la
Kongreso, s-ro Frédéric Cuvillier, eksministro, deputito kaj urbestro de
Bulonjo-ĉe-Mar, kiu partoprenis la ceremonion kaj poste akceptis la
kongresanojn en la urbodomo.

Memorinda tago entute.

Stefan MacGill

Vicprezidanto de UEA

Utilaj ligiloj al kongresaj informoj

Fine de la fermo de la UK en Lille, kiam

okazis la transdono de la flago al reprezentantoj de la sekva UK, okazis
neatendita edziĝpeto. Vidu la momenton ĉe:

https://youtu.be/WAqtaA_eAhk

Mallonga belga franclingva raporto pri Esperanto okaze de malfermo de
malfermo de UK 2015 en Lille, sendita en dimanĉo la 26an de julio:

<http://www.rtl.be/videos/video/543795.aspx>

Seso da raportaĵoj pri la kongreso estis dissenditaj tra la semajno flanke
de la Pola Retradio, pretigitaj de estrarano Barbara Pietrzak:

www.pola-retradio.org kaj <https://www.facebook.com/pola.retradio>

Video-prezento de la malfermo de la UK en Lillo, paĝo: "Chaine des en-
fants bilingues" kaj sekvu la ligilon:

<https://www.youtube.com/user/enfantsbilingues>

Kongresaj kurieroj (*La Belfrido*) redakitaj de Stano Marček, elŝulteblaj de:

<http://uea.org/kongreso>

Informoj pri la paroligaj kursoj sub gvido de Katalin Kovats kaj Sylvaine
Lelarge, pri Esperanto (80 kursanoj je elementa nivelo, kaj 150 je progre-
siga), pri la franca (80 komencantaj kaj 60 progresigaj) ankaŭ pri la KER-
ekzamenoj (56 kandidatoj el 17 landoj):

www.edukado.net

Bernard bonvolis iom skizi pri sia UK-semajno

Dimancho, 26 julio

Solena Inaŭguro. Emocioj.

Libroservo. Laŭ mia sento la libroservo prezentas/proponas **ne** sufiĉe da libroj, ĉefe koncerne la plej novaj.

La estraro respondas. La kontoj de la kongresoj ...!

Nacia vespero. Mi ege ŝatis. Belega bildo de la franca kulturo.

Bedaŭrinde forgesis ĉeesti la aŭtorajn duon-horojn de Zbigniew Galor kaj Jukka Pietiläinen, pri ilia verko "UEA, en konscio de esperantistoj".

Lundo, 27 julio: Kleriga Lundo

Prozo en Esperanto: ĉu ni havu minuskomplekson? Istvan Ertl, kaj, kaj... "Pardonu min! Mi ne sciis. Kiel pardonpeti en Esperantujo? Kristin Tytgat

La arto publike paroli, Humphrey Tonkin
Nur interesegaj aferoj! Mi vere ŝatis tiujn tri prelegojn.

Bedaŭrinde miaj malsanoj estas tro gravaj por resaniĝi el miaj malsanoj:

Mi havas multajn minus-kompleksojn, mi tro ofte pardon-petas (tamen miaj vorto-trezoro kaj esprimo-kolekto estas nun pli riĉaj dank'al Kristin Tytgat) kaj mi ne kapablas paroli publike (kaj tute ne en Esperanto) !

Rigardi kaj aŭskulti Tonkin paroli publike estas mia preferata teatraĵo.

Poste mi ankoraŭ povis ĝui la arton prelegi de Tonkin en La Librairie Internationale pri la libro de Tivadar Soros. Prelego en Esperanto brile tradukita en francan per Istvan Ertl. Ni estis malmulte (ĉirkaŭ 30) sed la saloneto estis plenŝtopita. Fakte nur unu persono-laŭ mi ne estis kongresano kaj tiu persono, se mi bone komprenis ŝin, ne atendis aŭ esperis lingvon nek rimedojn por scii kiel maskeradi

ĉirkaŭ la morto, sed eble esperon!

Vendredo, 31 julio

Komitato de UEA, la kontoj, la kontoj, strange tiu afero de la kontoj de la kongresoj! Kion oni ne devas scii, eĉ ŝajne la estraranoj?!!!

Fine-vere estis tro da homoj en tiu kongreso! – ni fine trovis en la amaso nian japanan amikinson, Micuko, kaj tagmanĝis kun ŝi. Iom da kongresa temo.

Oratora konkurso: la plej bona prelego estis de Otto Prytz!

Venontaj UK-oj. Eĉ la urbestro de Nitro! Eble ni aliĝos por Nitro, bone vendita!


Aŭkcio: alia grava teatraĵo! Mi nur sukcesis por unu libro: Verdaj Donkiĥotoj de Julio Baghy.

Por du aliaj mi estus devinta pli kromaldoni! Kaj unu libro, kiun mi atendis, ne estis proponita, verŝajne pro manko de tempo.

Vespermanĝo kun José Antonio Vergara

Internacia Arta Vespero: kutime – laŭ mi – tio estas la ĉefa spektaklo de la Kongreso pro la ĝoja bunteco kaj la granda diverseco de kompetenco pri diversaj artoj – tamen ĉefe pri muziko kaj kantado-de la esperantistoj. Io ne bone funkciis, ĉu ne? Oni diris al mi, ke estis praktikaj kaj teknikaj problemoj, kaj la organizantoj renkontis diversaj malfacilaĵoj. Jen kion mi skribis en mia taglibro: "Internacia Vespero: estis malkovroj. Sed... do... kion diri... nenion. Mankis iom da diverseco. Internacia koruso! Ĉina kantistino ... bonege ... sed nur por unu aŭ du kantoj kaj sen paroladoj. La Internacia Vespero laŭ la nova maniero ne estis bone akceptita de ĉiuj. Tiu afero de konkurso estis iom stranga. Laŭ multaj la rezulto ne estis vere komprenebla.

Bernard Behra



Rememoroj pri Tempo de Silko kaj Pajlo

Estas kolekto de tre interesaj rakontoj pri malnova Japanio, inter la fino de la 19a jarcento kaj la nuna moderna Japanio. La libro estas tre bele ilustrita de Susumu Saga kaj tradukita de Judyta Szczerbicka Yamato. Afrankite 26 eŭroj

Poŝamiko



Poŝamiko

Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn, tekstetojn, kelkajn ekzercojn kaj laŭtemajn bildvortarojn riĉe kolor-ilustritajn. La poŝforma eldonaĵo (A6) bone povas servi kiel poŝlibreto al kursanoj je komencanta kaj komencinta niveloj, aŭ kiel varbo-celaj donacoj kaj propagandiloj. Afrankite: 6,50 eŭroj

Etaj rakontoj pri la katedralo de Strasburgo



Jen tre ĉarma kaj interesa libro pri la katedralo de Srasburgo. Ĝin verkis kaj kompilis Sûzel PAILHES kun la deziro, ke ĝi aperu en 9 lingvoj. La unua eldono estis en la franca, germana kaj angla. Nun aperis la dua eldono en la hispana, rusa kaj Esperanto.

Sekvante du scivolemajn infanojn, vi malkovros la etajn rakontojn de la katedralo de Strasburgo. Bildoj, personoj, legendaj lokoj ekvivas. Tiam eniru serĉu kaj ...trovu.

48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo	12 €
Afranko en Francio	4 €
Afranko al Eŭropo	3 €

Tiuj libroj estas mendeblaj ĉe nia kasiro: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

Mulhouse-Espéranto
CCP 19684 F Strasbourg

78a regiona staĝo kaj 37-a BAVELO-Seminario 16a - 18a Oktobro 2015 en Pforzheim

esperanto
France-Est



En Pforzheim novaĵoj allogas.



Pforzheim – fondita en Romia tempo, grave detruita per bombatakoj dum Dua Mondmilito, poste rapide kaj per (tro) multege da betono rekonstruita: Pforzheim ne estas konata kiel turista allogaĵo, sed kiel urbo de la industrio pri oro, juveloj kaj ornamaĵoj.

Per la seminario en Pforzheim BAVELO serĉas novajn vojojn: ni forlasos la bone konatan sistemon de kursoj por komercantoj – progresantoj – parolantoj, anstataŭ tio ni proponas unu metiejon/atelieron por ĉiuj kune, por „lernantoj“ kaj ĉiuj, kiuj kuraĝas ekpaŝi survoje al instruado. Per malgrandaj grupoj, kie la roloj de instruanto kaj lernanto interŝanĝiĝas alterne.

Ekkuraĝu kaj elprovu kun ni tiun ekscitan eksperimenton.

Pli precize: la sabata antaŭtagmezo enhavos modulojn, kiuj vere estas necesaj kaj gravaj por ni ĉiuj, eĉ por tiuj inter ni, kiuj neniel intencas instrui Esperanton: Kiel mi ekkomencas interparoladon pri Esperanto? Kiel mi povas uzi la daŭron de liftveturado por doni al alia persono imagon pri mia fascino pri Esperanto? Kiuj estas bone elprovitaj ekzemploj por montri la flekseblon kaj esprimforton de Esperanto?



Tion ĉion ni ne ekscios per aro da sekaj prelegoj, sed kontraŭe ni povas mem elprovi kaj vige interŝanĝi proprajn spertojn.

La – tradicie „senlabora “ – sabata posttagmezo antaŭvidas la elekton inter pluraj eblecoj: promenado de la tri burgoj – la elstara bestoparko kun sovaĝaj bestoj el nia regiono (vidu dekstre – junaj idoj de lutro kaj apro) kun belaj promenvojoj – aŭ la esplorado de la ornamaĵa mondo (muzeo pri ornamaĵoj, oro kaj juveloj, „Schmuckwelten “aŭ la teknika muzeo, kiu prezentas teknikojn de la ornamaĵfarado).



ludemaj lutroj (supre) kaj junaj aproj en "strio-vesto"

Je dimanĉa mateno la instruemuloj daŭrigas la laboron en malgrandaj grupoj, dum la aliaj povas partopreni alian ekskurson, ekzemple al „panorametro “ (en la eksgasometro vi spektas 360°-bildon pri la antikva „Romo en la jaro 312“).

Krome atendas vin agrabla kaj interesa vespera programo.



Gasometro: Romo en la jaro 312



Parko apud rivero Enz

vendredo, 16a oktobro

17:00 - 18:00 alveno, aliĝo, ekloĝado en la ĉambroj, pliaj informoj
18:00 - 19:00 bonvenigo kaj **vespermanĝo**
 19:00 - 20:00 kurso – parto 1
 ekde 20:15 vespera programo (konatiĝo, filmo) poste knajpo

sabato, 17a oktobro

07:30 - 08:30 **matenmanĝo**
 09:00 - 11:45 kurso por ĉiuj
12:00 - 13:00 **tagmanĝo**
 14:00 - 17:00 ekskursoj por ĉiuj
 17:00 - 18:00 novaj libroj
18:00 - 19:00 **vespermanĝo**
 19:00 - 20:15 kurso
 ekde 20:30 muzika vespera programo poste knajpo

dimanĉo, 18a oktobro

07:30 - 08:30 **matenmanĝo**
 08:30 - 09:00 **redono de ĉambroj**
 09:30 - 11:30 kurso (ateliero, metiejo)
aŭ ekskurso
12:00 - 13:30 **tagmanĝo**, adiaŭo

Kostoj: Kotizo:30 € (por junuloj sub-30-jaraĝaj: 15 €).

Restado en la junulargastejo, kompleta pensio por 2 tagoj:

en 4-lita ĉambro 70 €

en 2-lita ĉambro 90 €

La aliĝo validas post alveno de via kompleta pago al nia konto aŭ al la konto de EFE:

BAVELO-Konto **IBAN:** DE21 6945 0065
0010 4179 22
BIC: SOLADES1VSS (Sparkasse
Schwarzwald-Baar)

CCP Esperanto France-Est
1997 72 W Nancy
per franca ĉeko al Esperanto France-
Est, sendata al
André GROSSMANN
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM

**Jugendherberge Burg Rabeneck
Kräheneckstr. 4**

75180 Pforzheim-Dillweißenstein

Tel: +49 7231 972660,

Fax: +49 7231 972661

info@jugendherberge-pforzheim.de

Koordinatoj :

latitudo: 48° 52' 8,09"

longitudo: 8° 40' 56,49"

Alveturo:

... per publikaj transportiloj

Pforzheim estas trajnstacio de la vojo Karlsruhe-Stuttgart-München. La junulargastejo situas en kvartalo Dillweißenstein en la valo de rivero Nagold.

- De la stacidomo per „Kulturbahn“ (direkte al Horb) ĝis haltejo „Weißenstein“. De tie estas 7-minuta promenovojo ĝis la junulargastejo.
- alternative: per buso (linio 3) de la stacidomo ĝis haltejo „Burggartenstraße“ (20-minuta veturado). De tie 5-minuta promenovojo al la junulargastejo.

... per aŭto

Pforzheim aŭte atingeblas per ekspresvojo A8 (Karlsruhe-Stuttgart).

Venante el okcidento prenu elveturejon **Pforzheim West**, venante el oriento prenu elveturejon **Pforzheim Süd**. Daŭrigu direkte al la urbocentro. Ĉe vojkruciĝo kun strato **B463** sekvu la direkton al **Calw**.

Tio gvidos vin rekte al urboparto **Dillweißenstein**. Ĉe la ponto trans rivero Nagold en Weißenstein veturu dekstren kaj sekvu la pliajn ŝildojn. Se estas pli facile por vi vidi la hotelindikilojn, tiam sekvu la ŝildojn por restaŭracio/hotelo Rabeneck. Ĝi situas tute proksime de la junulargastejo.

Aliĝilo al la Bavelo/EFE-seminario en Pforzheim

(bonvolu sendi ĝin al: Inge Simon, Brünner Str. 20, 73431Aalen
Tel +49 7361/ 360 615, rete: Inge.Simon@esperanto.de

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo
1		
2		
Adreso		
Telefono:		
Ret-adreso:		
Mi pagas la sumon.....		al Esperanto France-Est

Mi partoprenas

- (sabate matene)
en la kurso-programo *Lerni - Instrui - Ĝui*,
ĝeneralaj moduloj
- (sabate posttagmeze)
en la ĝenerala ekskurso, diversaj proponoj
(dimanĉe matene)
- alternativo 1: *Lerni - Instrui - Ĝui* specialaj
moduloj
- alternativo 2: ekskurso
- Mi serĉas pli komfortan tranoktadon, bonvolu
helpi min per rekomendoj

La kotizo rajtigas al elektita kurso. Ĝi ne repageblas.
La aliĝo validas post alveno de mono:
Pagebla per ĝiro al CCP Esperanto France-Est
197 72 W Nancy per franca ĉeko al Esperanto France-Est sendata al
André GROSSMANN
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM
ret-adreso:
andreo.ag08@free.fr

- | |
|-----------------------------------------------------------------|
| <input type="checkbox"/> Mi ŝatas vegetare manĝi |
| <input type="checkbox"/> Mi ŝatas vegane manĝi |
| <input type="checkbox"/> Mi havas alergion kontraŭ _____ |

Nombro da manĝoj kaj tranoktoj en Junulargastejo	vendrede	sabate	dimanĉe
matenmanĝo			
tagmanĝo			
vespermanĝo			
tranoktado <input type="checkbox"/> 2-lita <input type="checkbox"/> 4-lita ĉambro			

Nia Kalendaro 2015

septembro 2015	22 - 29	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a. Ni kune decidis pri la horoj kaj tagoj.
	25	Prezentado de Esperanto por kurso por komencantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
	28	verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo Le Printemps: 7 rue du printemps Mulhouse.
oktobro 2015	13 - 20	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
	2 - 16 - 23	Eble kurso por komencantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
	3	Sabate: Unua "Tago de Esperanto kaj de la Mondciviteco" de la 10a ĝis la 18a "Carré des associations" 100 avenue de Colmar en Mulhouse
	26	Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 20a30 en restoracio de la Poste, 10 rue de Huningue en Saint-Louis.
novembro 2015	03 - 10 - 17- 24	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
	6 - 13 - 20 - 27	Eble kurso por komencantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
	14 - 15	Deĵorado ĉe Bédéciné kaj en Ungersheim ĉe Ekologia foiro
	30	Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo Le Printemps: 7 rue du printemps Mulhouse

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.



100-a jubilea UK
en Lille, julio
2015

